

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº3, Marto, 2009

De nia librobreto

Antaŭ 3 jaroj ni translokigis nian societan libraron kaj kelkaj niaj samideanoj ricevis keston kun libroj por katalogigi la stokon. Poste ĉiuj redonis kestojn kun la listo de enaĵoj. Analizinte kelkajn listojn, mi rimarkis la libron, eldonitan en nia urbo en 1909. Ĝi estis “La kolomba premio” de Alexander Dumas, esperantigita el la franca fare de Benedict Papot, Chicago: American Esperantist Co., 1909 (originala titolo: “Prix de pigeons”). Interese! Kaj mi decidis esplori, ĉu ĝi estas la unua E-libro, aperigita en Ŝikago. Rapidege respondis la kuratoro de E-kolekto en La Brita Biblioteko s-ino Olga Kerzjuk. Ŝi informis, ke en la londona libraro oni posedas pli fruan libron, nome: Baker, Arthur. “The American Esperanto book: a compendium of international language”, 2nd edition, Chicago: American Esperantist Co., 1908. Sed ĝi estas la dua eldono kaj kiam aperis la unua? Informo pri ĝi forestas en la datumbazo de La Brita Biblioteko. Sekvantjare, 1909, same kiam estis eldonita la jam menciita libro de A. Dumas, en Ŝikago



aperis la deka eldono de A. Baker lernolibro. Tiu jaro (1909) donacis al la E-mondo ankaŭ la unuan (por nia urbo) originalan E-beletraĵon: Chase, R.M. “La mopso de lia onklo. Grotoskaĵo esperante elspensita...” 48 p. kun ilustraĵoj. Atente analizinte ĉiujn faktojn oni povas konstati, ke ĉi jare ni festu la 100 jaran datrevenon de la E-beletraĵo, aperigita en Ŝikagio (eble,

ankaŭ en Ilinujo). Gratulojn!

En 2009 en Usono (kaj ne nur) oni festas 200-an naskiĝtagon de la mondfama poeto kaj proz-verkisto Edgar Allan Poe. Al lia plumo apartenas renoma poemo “La Korvo” (angle – “The Raven”), kiu majstre tradukis membro de nia E-societo Jon Willarson. Estus bone, honorigante menciitajn jubileojn, eldoni en nia urbo dulingvan poemon de E. A. Poe en traduko de s-no J. Willarson. Kiu pretas mon-subteni la eldonon, bonvolu kontakti nian kasiston Karlo Gunn. Koran dankon!

En 2008 aperis monumenta verko de Geoffrey Sutton pri la literaturo de Esperanto. Ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa monografio pri la vasta temo, kaj iom mirinde, ĝi estas anglalingva. Kelkaj esperantistoj jam proponis, ke oni traduku la verkon “Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto”

(740 p. New York: Mondial) al E-o, sed kompreneble la anglalingva versio povas atingi multe pli grandan publikon, kiu ĝis nun tute ne konsciis pri la ekzisto de esperantlingva literaturo. Plian paŝon direkte al sia potenciala publiko la elstara verko faris la 6-an de februaro, kiam en la pinte prestiĝa literatura revuo Times Literary Supplement aperis ampleksa recenzo de John Wells.



La kasisto informas

Kiu legis la pasintmonatan n-ron de "Saluton!", eble menciis titol-artikolon de Ted Sanders. Do, s-ro Ted, kune kun sia edzino Diana, komencis lerni nian karan lingvon, aliĝis al nia E-societo kaj donacis \$50.00 por libro-eldonado. Imitinda agado! Dankegon!

El nia leterkesto

Dankon pro la Februara numero de via bulteno. Mi tre dankas vin pro la anonco pri nia landa kongreso en Majo en Sankta-Luiso. Mi esperas, ke multaj Esperantistoj el Ŝikago partoprenos. *Ron Glossop*

Ne forgesu

Nia bulteno jam informis vin pri UK-2009 en Pollando (vd. novembran n-ron) kaj kunveno de E-USA (vd. februaran n-ron). Kaj por 2009 Internacia Ligo de E-Instruistoj invitas vin al konferenco en Pollando. Je nur kelkaj horoj en trajno disde la UK-urbo 2009, la iama pola ĉefurbo allogas per unika historia medio pro kiu ĝi listiĝas en la Monda Heredaĵo de Unesko. Jam en 1364 ĝi iĝis universitata urbo, tradicio kiu daŭras ĝis nun – Krakovo havas ne malpli ol 23 altlernejoj kaj univesitatoj! Etoso de studenta urbo kuniĝas kun serioza universitata vivo de unu flanko, kaj multflanka turismo de la alia. En la urbo ekzistas la strato nome de nia samsocietano –**Kordylewski!**



Korespondi deziras

Bulgara s-ino 65j. universitata profesoro en Sofio deziras korespondi kun sinjoroj sam- aŭ pli aĝuloj por amikeco. Mi scias ankaŭ hispanan, rusan kaj kompreneble bulgaran lingvojn; Intereso: naturo, arto, turismo. Sofio estas ĉefurbo de Bulgario, kiu havas limoj kun Greklando kaj Nigra maro. Bv. kontakti al mia retadreso : lin.art@abv.bg

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

24an de Marto – Henry DUNANT, samtempulo de L. Zamenhof

28an de Aprilo – temo estos anoncita

